L'auteur, Robert Phillipson, souhaite vivement que son ouvrage *"Linguistic imperialism"* paraisse aussi en français. Les propositions qui permettraient sa traduction et sa publication seraient bienvenues.

*Henri MASSON*

Bibliografio / Bibliographie


EN *"Linguistic imperialism"*. Robert Philippson. Oxford : Oxford University Press. 1992.
EN *"English-Only Europe ?"*. Robert Phillipson. London : Routledge. 2003.
EO *"Chu nur-angla Europo ?"*. Robert Phillipson. Rotterdam : UEA. 2004 .
EN *"The Cultural Politics of English as an International Language"*. Alastair Pennycook. London : Longman. 1994).
EN *"English and the discourses of Colonialism"*. Alastair Pennycook (London : Routledge. 1998).
FR ***"Le défi des langues", par Claude Piron*** (Paris: L'Harmattan. 1994)
FR ***"La mise en place des monopoles du savoir"***. Charles Durand (Paris : L'Harmattan. 2002)
FR ***"La nouvelle guerre contre l'intelligence"***. Charles Durand (Paris : François Xavier de Guibert. 3 vol., 2002-2003).



GAZETARA SERVO DE SAT-AMIKARO = SERVICE DE PRESSE DE SAT-AMIKARO
Rédacteur /Redaktanto : Henri Masson
Kontrauspama retadreso / Courriel antispam : Forigu la "#" / Supprimez le "#".
<espero.hm@#wanadoo.fr> http://www.esperanto-sat.info


## Une courageuse réaction de salariés !

La société *General Electric Medical System (GEMS)*, sise à Buc (78), **entendait imposer l'emploi de l'anglais** dans les documents internes et sur les écrans informatiques. Après plusieurs protestations des représentants syndicaux du comité d'hygiène et sécurité (CHSCT) et devant l'inertie de la direction, une action en justice, pour infraction à la loi du 4 août 1994, a été lancée.

[... / ... ]

10 novembre 2004

## JUGEMENT FAVORABLE

Suite du communiqué du 23/11/2004 : LA *GEMS* EN ANGLAIS

Le jugement du tribunal de Grande Instance de Versailles a été rendu public le 12 janvier. Les salariés de la GEMS représentés par leurs syndicats CGT et CFDT, soutenus par la CFTC et plusieurs associations de défense et de promotion de la langue française, ont obtenu que la loi du 4 août 1994 soit enfin appliquée.

La direction de la GEMS est mise en demeure de traduire immédiatement
- les affichages des programmes informatiques ;
- les documents relatifs à la formation du personnel, à l'hygiène et à la sécurité ;
- les documents relatifs aux produits que la société fabrique ;
- dans un délai de 6 mois, tous les documents relatifs à tous produits présents sur le marché.

Ce jugement, qui est le premier du genre, est un sérieux encouragement pour les nombreux salariés français qui subissent chaque jour **la contrainte et l'humiliation de devoir employer une langue qui n'est pas la leur**. La cause est noble et la victoire est possible. Le combat des salariés et des associations ne vise pas à interdire la pratique de langues étrangères (au pluriel) quand les échanges internationaux l'imposent, mais de permettre aux salariés, en France, **d'échanger, de communiquer et d'être informés dans la langue nationale** conformément au droit inscrit dans notre Constitution.

Marceau Déchamps
Vice-président *Défense de la langue française*
(Le 13 janvier 2005)

# kalejdoskopo

## ... el la kuirlibro de avinjo Odette ...

*meleagrino-eskalopo*



Vi bezonos: tiom da eskalopoj tiom da gastoj.
1 ovo aŭ 2 laŭ la nombro de la personoj.
oleo – salo – pipro.
tiom da ŝinkaj tranĉaĵoj kiom da eskalopoj.
butero, margarino aŭ oleo laŭ viaj kutimoj.

Rostu viajn eskalopojn en „graso" laŭ via elekto.

Kiam ili estas malvarmaj, metu sur ĉiun eskalopon tranĉaĵon el ŝinko, sur ĝin, tranĉaĵon el grujero aŭ raspitan grujeron, peceton da butero.

Tiuj eskalopoj povas „atendi". Vi eĉ povas prepari ilin la antaŭan tagon.
Enfornigu ilin 15 minutojn por ke la fromaĝo fandiĝu kaj bele koloriĝu. Servu kun legomoj.

*Bonan apetiton!...*


---

## Vocabulaire informatique... à destination exclusive ( hélas ! ) des francophones

Les Anglo-saxons ont créé un suffixe pour désigner divers composants de l'informatique.
Il s'agit *de "ware".*

On a ainsi
- le hard*ware* : le matériel informatique
- le soft*ware* : tout logiciel
- le share*ware* : un logiciel requérant une participation financière
- le free*ware* : un logiciel entièrement gratuit

Des internautes francophones ont jugé utile de compléter ce vocabulaire informatique .
En voici le résultat
- un ensemble d'écran de veille : un dort*ware*
- un logiciel antivirus : un mouch*ware*
- un logiciel de classement : un tirware
- un logiciel de copie : un mir*ware*
- un logiciel de m., . un suppositware
- un logiciel de nettoyage du disque dur : une baign*ware*
- un logiciel de préparation de discours : un orat*ware*
- un logiciel de vote électronique : un isol*ware*
- un logiciel de compression de données : un enton*ware*
- un logiciel pour documents en attente : un purgat*ware*
- un logiciel très compliqué: un assom*ware*
- un réseau local d'une entreprise : un coul*ware*
- un serveur de réseau : un abreu*ware*
- une poubelle Windows : un dépot*ware*
- une réunion des responsables informatiques : un tupper*ware*
- une salle informatique non climatisée : une rôtissware



Et enfin, le plus important dans la conjoncture actuelle :
- un logiciel d'aide à la demande d'augmentation de salaire : un vatfaire*ware* !...

...Allez... ore*ware* !!!



Maja LOSKUTOVA, filino de Tatjana Loskutova (instruistino pri la franca kaj Esperanto), ambaŭ esperantistinoj el *Ivanovo ( Rusio )* deziras labori venontan someron en Francio kontraŭ gastigado. Se vi mem aŭ konatoj pretas akcepti ŝin, bv direkti proponojn rekte al ŝi *** :

Maja LOSKUTOVA
maja84@mail.ru
Poŝt-adreso *: ul Generala Khlebnikova, 48-71 153048 IVANOVO Rusio*

*"Ĉi-somere vi volus serĉi laboron en Francio kiel "au-pair-knabino". Mi jam havis sperton okupiĝi pri la infanoj dum E-renkontiĝoj ne nur rusiaj, sed ankaŭ internaciaj. Tiu ebleco povus doni al mi trafi la francan medion por lerni kaj praktiki la francan lingvon, kies bazajn sciojn mi daŭre perfektigas. Mi estas 20 -jara (printempe 21), denaska esperantistino, nun studentino de komerc-ekonomia universitato. Bonvolu helpi min sendante ĉi-informon pere de via servo. Eble troviĝos iu franca familio, kiu bezonos vartadon de infano(j) dum ĉi-somero ».*

Fille de Tatiana Loskutova, enseignante de français et d'espéranto, Maja cherche un travail au pair en France pour l'été prochain. Elle a déjà de l'expérience pour s'occuper des enfants, pas seulement russes mais aussi dans des milieux internationaux. Elle a déjà des connaissances de base en français et se perfectionne. Âgée de 20 ans, elle pratique l'espéranto depuis son enfance et elle suit maintenant des études de commerce et d'économie à la filiale universitaire spécialisée d'Ivanovo Elle avait accompagné sa mère, Tatiana, durant un séjour en Vendée en 2002.

---

*** ... aŭ al la redaktejo de *« La Informilo »* : Pol DENIS, 5 Chemin de Blamecourt, FR-55000 BAR-le-DUC
pol.denis@wanadoo.fr

PS : ... discrimination ! : ... les « agences spécialisées » consultées ne prennent que les demandes émanant de la communauté européenne !...

## ... rekte el Samarkando !...



*Karaj francaj amikoj,*

*Postrevene hejmen mi publikigis ( la 10-an de februaro kaj la 17-an de februaro 2005 ) en la populara tutlanda ruslingva semajna gazeto **"Biznes Vestnik Vostoka"** ( mallonge "BVV" - **"Negoca Heroldo de Oriento"** ) du tutpaĝajn artikolojn pri mia vojaĝo al Francio. La gazeto aperas en nia ĉefurbo Taŝkento kaj estas "disvastigata en urboj de Uzbekio, de aliaj ŝtatoj de Centra Azio kaj de Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj ankaŭ en la aviadiloj de la Uzbeka flugkompanio kaj en la trajnoj de Uzbekaj fervojoj". La artikolo, aperinta en la rubriko "Lando-Partnero", estis anoncita frontpaĝe de la gazeto.*

*Jen la titoloj de la ĉapitroj:*

- "Capitale de la Chaussure" au Ĉefurbo de Ŝuoj
- Sankta Loko por Turistoj kaj Pilgrimoj
- Vino, Fromaĝo kaj. . . Krokodiloj
- Avignon - Urbo el Fabelo Sinjoro
- Fabela Palaco de la Franca Poŝtisto aŭ Revo Fariĝinta Realo
- Ni Festas Kristnaskon
- Likvor-faristoj en sutanoj
- Sinjoro Fontbonne serĉas siajn Uzbekajn Amikojn

*...Refoja dankesprimo al niaj francaj kolegoj por bonkora akcepto, por amikeco kaj gastamo. Estas listigitaj la nomoj de Gaston Riste, Gisèle Besson, Richard kaj Lulu Campos, Frédérique kaj Frederic Gross, Monique Fillat, Jean-Claude kaj Claudette Gross, Jean Revet, Josette Bourgeois. . .*

*Ni atendos vin amikoj, en sunplena lando Uzbekio !*

*Kun amikaj salutoj kaj bondeziroj,*
*Anatoli*

Anatoli Ionesov
*Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro*
P. O. Box 76, UZ - **703000 Samarkando**
Respubliko Uzbekistano

---

NB el la redaktejo de "La Informilo: *niaj legantoj povas malkovri en la kutima rubriko "la gazetaro kaj la lingvo-problemoj" parton (fotokopion ) de la gazeto aludita de nia amiko Anatoli.*

## ... Kiam Esperanto "aktoras"en filmo ! ...

*Popularmuziko de Vittula*: Esperanto plenumas sian rolon... ankaŭ en la filmo!



En la libro "Populärmusik från Vittula" de *Mika-el Niemi*, en finna traduko "Populäärimusiikkia Vittulajänkältä", *Niila*, silenta knabo de la norda forgesita vilaĝo, subite ekparolas en Esperanto ! La interpretistino de la fora afrika gasto subite malsaniĝas. En la preĝejo neniu scias aliajn lingvojn, sed fine la gasto provas per Esperanto. Tiam *Niila* sin anoncas. Li estas la savanto, same esperanto !.

Tiu fascina libro vekis ne nur intereson pri la nordaj partoj de Svedio, kiuj nun pro la libro ricevas multajn vizitantojn, ĝi ankaŭ donis tuŝon de esperanto al siaj multegaj legantoj !...

Ĉiu leganto trovas en tiu libro aparte karajn erojn. Evidente la preĝeja sceno estas aparte signifa por la Esperanto-parolantoj. Kun scivolo mi iris rigardi la filmon. Ĉu kaj kiel Esperanto aperos? Rezultis nenia elreviĝo.... Esperanto ludas bele ĉarman rolon ! Ni, Esperanto-parolantoj eĉ havas apartajn okazojn ridi. La situacio, en kiu *Niila* lernas Esperanton, estas pli klara en la filmo ol en la libro. *"Kiel vi fartas?"* demandas la radio. La saman frazon *Niila* povas reuzi ankaŭ en la preĝejo.

Al la realigo de la Esperantlingvaj partoj kontribuis esperantistoj diversmaniere. Interalie *Leif Nordenstorm*, redaktoro de *La Espero*, la organo de *Sveda Esperanto-Federacio*, rakontas ke li, dum la UK en *Gotenburgo*, pere de sia poŝtelefono, helpis la aktorojn pri la elparolo ! *Roland Lindblom* en la informilo *La Hirundo*, novembro 2004, donis pliajn informojn:

"En junio iu telefonis al SEF kaj petis helpon. Ili bezonas virinan voĉon, belan. Mi tuj pensis pri *Natalja Gerlach* -konata kiel kantistino kun *Ĵomart*-. Oni kontaktis ŝin, kaj jam postan tagon ŝi vizitis la filmteamon.

En la filmo, kaj en la libro, oni ricevas klarigon, kial la knabo *Niila* povas paroli Esperanton. Li iĝis lernanto de radio-kurso, kaj en la filmo ni aŭdas la voĉon de *Natalja*.

Ĉe la fino de la filmo aperas amaso da nomoj, artistoj kaj helpantoj. Tie aperas nomo ankaŭ de alia esperantistino -*Anna-Maria Lange* el *Lund*. Ŝi jam frue havis kontakton kun la verkisto *Niemi*, kaj poste kun la filmteamo.

Ni esperantistoj povas ĝoji pro la mencio de Esperanto, kaj ni eble povas atendi, ke *Mikael Niemi* iom lernos la lingvon, almenaŭ iomete, ĉar li aĉetis lernolibron ĉe la Esperanta librostando en Bokmässan en *Gotenburgo*...

La filmo premieris en *Pajala* la 24-an de septembro, kaj en Finnlando la 8-an de oktobro 2004. En Svedio ĝi allogis pli ol 300 000 personojn al kinejo, en Finnlando 100 000. La filmo estas ankaŭ luebla kaj aĉetebla kiel videofilmo (VHS kaj DVD). La filmo partoprenos en la *Berlina filmfestivalo*, la 10-12ajn de februaro, la konkurs-kategorion *junulara filmo*. En la angla ĝi ricevis la nomon *Popular Music*.

*Anna Ritamäki*

[ el la revuo *"Esperantolehti"*, n-ro 1/2005. ]

## Fieras "La Informilo" !...





Laù komuniko de la jara konferenco de la ***American College of Cardiology***, senbride ridi povas efiki pozitive sur la kardiovaskul-sistemo... Ridi ja malstreĉigas la ŝtofon de la interna parto de la sangaj vaskuloj, t.e. la endotelio. Laù la fakuloj tio alportas rezulton same kiel fizika trejnado !

Oni petis du grupojn da abonantoj de "La Informilo", bonfartaj volontuloj, okulumi al du artikoloj malsimilaj. Unu devis dediĉi sian atenton al legado de ĵusa aserto de la eks-ministro Allègre (magazino "EXPRESS") pri la unika internacia helplingvo, t.e. la angla ( ? ! ), kaj la dua grupo estis invitata ĝui legadon de la paĝo "anekdotoj"de nia bulteno...

Oni observis **malgrandigon** de la sangofluo ( mezurita ĉe la brako ) **je 35%** ( kompare al la normala ) ĉe la legintoj de la unua artikolo, kaj male, **grandigon je 22%** de la aludita sango-fluo ĉe la legintoj de la paĝo pri anekdotoj!...

Ni danku „La Informilo"-n pro ĝia saniga efiko ĉe la ridemuloj !

## Pri "La Vortaro"...



Karaj abonantoj,

Ni havas la plezuron anonci al vi, le la *serba* estas nun disponebla... Gratulon al Sinjoro **Dimitrije JANICIC**, kiu kreis tiun vortliston, kaj kiun ni bonvenigas inter niaj kunlaborantoj. La komunumo de le uzantoj de *La Vortaro* kaj specife niaj serbaj amikoj varme dankas lin pro lia laboremo kaj sindonemo.

Elŝutu la serban vortliston kiel kutime ĉe :

http://www. la-vortaro. net

Por ke la kirilaj literoj estu bone videblaj, necesas, ke la plurlingveco estu instalita en *Vindozo* kaj la kirila alfabeto selektita.

Ĝis baldaù !

*Bernard(o)*

## Communiqué de "Réinsertion et Espéranto" ( APSIKE 1997 )



*Réinsertion et Espéranto* ( *APSIKE 1997* ) vous informe que dans les librairies, les supermarchés et les stations d'essence des autoroutes se trouve désormais parmi tous les petits guides édités par *AEDIS*,

AEDIS **l'Espéranto**: " l'essentiel ". (numéro 169)

Ce petit guide de huit pages, à la présentation attirante, est le premier d'une série de quatre. Il est en vente au prix de 3,05 €. Il a été réalisé par Zohra MRAIHY et Thierry SALADIN. Le deuxième petit guide ("conversation "), déjà réalisé, devrait être sous presse dans quelques semaines. Pour ce qui concerne les guides suivants, l'éditeur se décidera en fonction du chiffre des ventes des deux premiers petits guides.

Nous espérons donc que le public lui fera bon accueil et surtout que **les espérantistes sauront non seulement l'acquérir** mais également s'en servir pour la propagande et en faire la publicité.

En tant qu'auteur, *Réinsertion et Espéranto* propose aux responsables des libroservoj, et d'une manière générale pour toute commande minimale de 20 exemplaires, le petit guide à un prix préférentiel. Prière de nous contacter.

Rappel de nos coordonnées: *Réinsertion et Espéranto* 26 rue Enclos Fermaud **34000 MONTPELLIER**
Téléphone : 04. 67. 91. 01. 96 Télécopie : 04. 67. 92. 75. 44 Mobile: 06. 66. 46. 77. 07 apsike1997@yahoo. fr
http://apsike1997. free. fr

═══

*APSIKE 1997* ( *Asocio Por la Sociala Integriĝo Kaj por Esperanto* ) informas vin, ke en la librovendejoj, la superbazaroj kaj la aŭtovoj-butikoj disponeblas inter la gvid-libraro far *AEDIS*,

**Esperanto**, " la plejgravaĵo" ( numero 169 )

Alloge prezentita tiu ok-paĝa gvid-libro estas la unua de kvaropo. Ĝi vendiĝas kontraŭ 3,05 €. Ĝin verkis Zohra MRAIHY kaj Thierry SALADIN. La venonta gvid-libro ( "konversacio" ) teorie estos presata post kelkaj semajnoj. Koncerne la sekvantajn gvid-librojn, la eldonisto decidos mem laŭ la vendokvanto de la unuaj du....

Ni esperas, ke la publiko akceptos ĝin favore, **kaj ĉefe ke la francaj esperantistoj profitos ĝin,** ne nur por varbi, sed ankaŭ por uzi ĝin kaj reklami. Tiurilate, ĉar APSIKE estas la aŭtoro, la respondeculoj de libroservoj turnu sin rekte al ni por profiti de rabato en la kazo de mendo almenaŭ 20-ekzemplera.

Kontaktu nin al la ĉi-suba adreso :

*Réinsertion et Espéranto* 26 rue Enclos Fermaud **FR - 34000 MONTPELLIER** Telefono : 04. 67. 91. 01. 96 Fakso : 04. 67. 92. 75. 44 Poŝtelefono :06. 66. 46. 77. 07apsike1997@yahoo. fr Hejm-paĝaro : http://apsike1997. free. fr

═══ ✪ ═══

## Laŭ informo el "NUN" ( Marcos marcos@esperantoland.de )

Al la serio de *Vikilibroj* ( frata projekto de *Vikipedio* ) jam ekzistantaj en 9 aliaj lingvoj, ĵus aldoniĝis "Kuirlibro" en Esperanto, kiun ĉiu povas viziti ĉe http://eo.wikibooks.org/wiki/Kuirlibro . Eblas libere aldoni receptojn, kaj pliriĉigi la enhavon.

═

D'après une information de "NUN" (Marcos marcos@esperantoland.de ), un *"Livre de cuisine"* en espéranto vient juste d'être ajouté à la série des *Livres Viki* ( projet frère de *Vikipedia* ) qui existent déjà en 9 langues et que chacun peut visiter sur http://eo. wikibooks. org/wiki/Kuirlibro. Il est possible d'ajouter des recettes, d'enrichir le contenu.

═

GAZETARA SERVO DE SAT-AMIKARO = SERVICE DE PRESSE DE SAT-AMIKARO

═══ ✪ ═══


## ... lastminute ...

france 3 lorraine champagne ardenne

FR3 Nancy-Lorraine dissendis dum la tagmeza gazeto de la 16a de marto ( 12/14h ) intervjuon de Jean-Luc THIBIAS, prezidanto de nia asocio *Esperanto France-Est*. Tiu evento okazis je tre favora momento por kapti la atenton de la publiko.

Al trafaj demandoj de la du ĵurnalistoj, trafaj respondoj de nia amiko sintezis lerte kaj racie la problemon de aktuala interkomunikado kaj ĝian solvon pere de esperanto.

Kelkaj eroj de *„La Kompanoj"* de Georges Brassens, kantitaj de Jacques Yvart, alportis pluson al la intervjuo. La deĵorantoj eĉ aludis la koncerton de la grupo *„Kajto"*, okazonta la ĵaŭdon 7an de aprilo en Nilvange ( 57 ).



pour vous initier à la seule
vraie langue internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...

nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...



INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
**SETE** ( Hérault ) = 20/27ajn de aŭgusto 2005



*« ESPERANTO, KULTURO KAJ PROGRESO »* proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Profitu, samtempe, trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bona vetero sed ekstere de la somera troa homamaso.

Ĉe ni, vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj ankaŭ banadon, ekskursojn kaj... bonan manĝaĵon!

Aliĝiloj, informoj, rezervado: *E. C. kaj P. 5 rue du Dr Roux*
***FR-34090 MONTPELLIER***
jf.passarella@free.fr

SEJOUR LINGUISTIQUE EN BORD DE MER
**SETE** ( Hérault ) = du 20 au 27 août 2005

*„ ESPERANTO, CULTURE ET PROGRES"* vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Espéranto.

Profitez-en pour passer en même temps d'agréables vacances à **Sète**, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps agréanble et en dehors de l'afflux estival.

Chez nous, vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, excursions et... bonne table!

Inscriptions, informations, réservation: *adresses ci-dessus*




## 13a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

**CALELLA ( BARCELONA ) Hispanujo = 1/8 -10 = 2005**
**„sub aŭspicoj de Hispana Esperanto-Muzeo"**
**Hotelo „Vila" – str. Sant Josep, 66**

La hispana registaro decidis alte kaj range rememorigi la kvaran centjaran eldono de **„LA INĜENIA HIDALGO DON QUIJOTE DE LA MANCHA"**. Ni pensas aliĝi al tiu kultura evento „la Semajnon" kaj ni aperos en diversaj informaj medioj

**== PROGRAMO ==**

**Interalie**: Luis Serrano Perez prelegos pri *„Alitipa legado de Don Kiĥoto"* = Pere Navarro-Rosines, D-ro pri biologio de la Universitato de Barcelono pritraktos *„De la akvo al la Tero – Evoluo de la vegetaĵoj"* = Stano Marcek, redaktoro de „ESPERANTO" prelegos pri *„100 jaroj de la revuo ESPERANTO"*... Esperanto-kursoj sub la gvidado de S-ano S. Aragaj.

Denove kaj por la dua jaro jen la *„Premio Ada Sikorska"*.

Aldoniĝos klasikaj interkonaj vesperoj kun frandaĵoj, muzika ensemblo kun la nomataj „haban-kanzonoj"... Jen neforgeseblaj vesperoj en la plej granda internacia etoso... Vera familia festo

Ni ne forgesu la ( minimume ) kvar ekskursoj en la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵo.

Kaj pri nia *„Hotelo Vila"*: Situo en la urbo-centro, proksima al la fervoja stacidomo, dek minutoj piede... kaj **120 metrojn** de la strando!...... Salonoj de tradiciaj ornamitaj gustoj... Ĝiaj artaj plafonoj kaj kolonoj donas al ni la plezuron kvazaŭ promeni tra aliaj tempoj... Sed la hotelo ne forgesas la modernaĵojn, kaj niadispone estas memservo en ampleksa manĝoĉambro.

Kompleta pensiono: 30 €, en dulita ĉambro po persono kaj tago;
40 €, en unulita ĉambro ( unu persono ) po tago.

... Atentu: ĉiu aliĝinto ricevos senpage ekzempleron de la verko **„DON KIĤOTO"** !...

NI ATENDAS VIN!

Informoj kaj aliĝiloj ĉe :

**Luis Serrano Pérez**, Apartat 423, ES-08200 SABADELL (Barcelona) Hispanujo
luis_serrano@mixmail.com



*Vivigu nian kulturon!...*
*Provizu vian bibliotekon!...*

# El nia libroservo

## Informoj



⇒ **La libroservo partoprenos la 57an Regionan Staĝon de esperanto en Lucelle la 15an/16an/17an de aprilo 2005 !**

⇒ Vi sendube rimarkis, ke en la Informilo 128 aperis la tuta katalogo de la libroservo. Por praktike uzi tiun katalogon, sufiĉas elpreni la foliojn el la revuo kaj faldi ilin al 16 paĝa kajereto!

## *Kroata milita noktolibro*

Kiel ĉiuj jam scias, nia kara samideanino Ginette Martin majstre tradukis la verkon de Spomenka Ŝtimec:



**JOURNAL DE NUIT**: Tiu ĉi libro estas akirebla rekte ĉe Ginette aux pere de nia libroservo (12,00 eùroj)

La libroservo ofertas ankaŭ la originalon: **Kroata Milita Noktolibro** (8 eùroj) kaj la germanlingvan version : **Kroatisches Kriegsnachtbuch** (8 eùroj).






## *Nove alvenintaj seriozaj libroj !*

**Al lingva demokratio**: 216 p, **Fettes/ Bolduc**,*U.E.A.*, **10,20 €**, trilingva debato pri lingvo demando

**Al nova internacia lingva ordo**, 240 p, **Lee** *U.E.A.*, **18,00 €** trilingva raporto

**Por aktiva lingvopolitiko**: 72 p, **Blanke**,*U.E.A.*, **7,20 €**, Aktoj de la lingvpolitika seminario, en la 81a Universala Kongreso en Prago 1996



**Terminologiaj konsideroj**, 180 p, **Werner**, *Kava Pech*, **15,00 €,** fakaj studoj

**Lingvaj babilaĵoj**,196 p,**Cherpillod,** *La Blanchetière*,**15,00 €**, *Nova libro pri diversaj punktoj de la lingvo*

## Por mendi librojn:



1. Vi sendas vian mendon
- per poŝte (la plej sekure) al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la dorsflankan aŭ alipaĝan mendilon)
- per e-poŝto al «libroservo.efe@wanadoo.fr»
- nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.

2. Vi baldaŭ ricevas viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj (maksimume 3,58 euroj por adreso en Francio))

3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al «libroservo 2800-76 H NANCY» (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo «libroservo» sendita al la adreso de la libroservo.

Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al «LIBROSERVO» IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97 BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo

## Ĵusnaskitoj




**La kastelo de vitro**, romano, 200 p, **John Francis** *U.E.A.*, **18,00 €.** *Kiam Stela konstatis, ke temas pri magio, ŝi ekscite kuris laŭ la rivera bordo por...*

**Hundo de Flandrio**, romano, 52 p, **Ouida,** *F.E.L.* **5,95 €.** Kortuŝa, klasika romaneto pri la amikeco inter knabo kaj hundo en malamika mondo




**Švejk** Romano, 714 p **Jaroslav HAŜEK** *Kavapech,* **39,00 €** Aventuroj de la bava soldato Švejk dum la unua mondmilito.




**Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo** vojaĝrakonto, 256 p, **Zef Jégard,** *Memeldono* **21,00 €** kaj la franclingva versio: **Papy fait le Tour du monde**








**Rapide pasis la temp'**-Poezio, 92 p, **Urbanova** *Kava Pech* **6,90 €**

**Mil unuaj vortoj en esperanto**- Lernolibro 64p, **Heather Amery,** *Esperanto Asocio de Britio* **12,00 €** Nova eldono de la libro je 1000 ilustritaj vortoj.

## El Ruslando

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10 11 12















1: **La dua invado de marsanoj**, 112p, **Strugackij**, *Impeto,* **4,00 €.** Scienfikcia romano.
2: **Elektitaj verkoj**, 240p, **Puŝkin**, *Impeto* , **10,00 €.** Poemoj kaj prozajoj de la fama rusa verkisto.
3: **La fora ĉielarko**, 136p, **Strugackij**, *Impeto*, **4,00 €.** Scienfikcia romano.
4: **La loĝata insulo**, 304p, **Gbelo Koffi,** *Impeto.*, **15,00 €.** Scienfikcia romano.
5: **Oni ne pafas en Jamburg**, 136p, **Mikaelo Bronŝtejn**, *Impeto*, **4,00** €. Romano.
6: **De nenie kun amo** 160 p, **Brodskij** , *Impeto,* **4,00 €.**Elektitaj verkoj prozaj kaj poemaj.
7: **Pikniko ĉe vojrando** 192p, **Opo**, *Impeto*, **5,00 €.** Scienfikcia romano.
8: **Jen denove**, 120p, **Mikaelo Bronŝtejn**, *Impeto*, **4,00** €. Poemoj de Bruna Ŝtono.
9: **Kantoj**, 32p, **Mikaelo Bronŝtejn**, *Impeto*, **3,00** €. 21 kantoj kun muziknotoj.
10: **Du lingvoj**, 192p, **Bruna Ŝtono**, Impeto, **6,00** €. Poemaro.
11: **Elevatora Seulo**, 112p, **Kim Yocho**, Impeto, **3,00** €. Poemoj el la korea kun koreaj, rusaj kaj esperantaj tekstoj.
12: **Malfacilas esti dio** 168p, **Opo**, *Impeto*, **4,00 €.** Scienfikcia romano.

✂.......................................................................................................................................................

## MENDILO

Bonvolu sendi tiujn librojn: al jena adreso:

- S-ro/ino
-
-
-
-

-
-
-
-

En la Subskribo:

# Ĉu vivis la grafo MONTE KRISTO?




*La grafo Monte Kristo estas fame konata romaneca figuro el verkaĵoj de neforgesebla verkisto Alexandre Dumas. La verkaĵo estis kelkfoje filmita kaj la nomo de la heroo estas tiom konata, ke ĝi delongtempe transpaŝis la limojn de aventureco. Ĉu iam vivis lia sekreta venĝanto? Ĉu la mistera historieto pri amo, envio aŭ venĝo havas veran fundamenton aŭ ĉu temas nur pri nura fikcio? Kiam angla verkisto ULSHTON WULFF studis en arkivo de pariza polico malnovajn krimi-okazojn, unu el ili ŝajnis al li tre konata. El la biblioteko li alportis la romanon de Dumas kaj ne eliradis el surprizego! La nomoj el la arkivo estis ja aliaj ol la konata libro, sed alie ĉio kongruis. El kiaj realaĵoj Alexandre Dumas eliradis?*

*La junulo PIERRE PICOT la 1. 4. 1807 fanfaronis en unu kafejo, ke li estas fianĉo de la belega kaj riĉa MARKETA de VIGOURS. Liaj samcivitanoj LOUPILEN, CHOBARD? agrokulturisto SOLARIS kaj luanto ALLU, interkompreniĝis, ke la fanfaronantan junulon punos. Ili lin sekrete akuzis, ke li estas spiono en anglaj servoj. Ankoraŭ la saman tagon li estis arestita kaj pli poste enkarcerigita en la fortikaĵo FENESTRAL. Lia ververa fianĉino kaj geamikoj vane lin serĉadis. La mizera junulo konsciiĝis, ke li fariĝis viktimo de kruela ŝerco, sed kontraŭ la juĝa institucio li absolute malsukcesis.*

*Post tri jaroj de enkarcerigo li ricevis en pano paperon de alia malliberulo el najbara ĉelo. Nokte li komencis ĉizi la muron kaj post du jaroj de granda laciga laborego trarompiĝis al pastro Guissepe TARRY. La malfeliĉulon enkarcerigis lia propra frato, la princo CARLO TARRY, ĉar li ne povis ekscii de li sekretajn informojn certigantajn senmezuran riĉaĵon. En 1894 en Francio ekregis la BURBONOJ, (la burbonanoj). Pierre Picot post 7 jaroj liberiĝis dank'al ĝenerala proklamita amnestio. Li trovis la trezoron de Guissepe TARRY, riĉiĝis kaj ekiris serĉi la homojn, kiuj al li kaŭzis tiom da malbono. Li trovis la luanton ALLU kaj proponis al li valoran diamanton, se li ekscios de li la loĝejon de Loupien, Chabord kaj Solaris. Allu certan tempon hezitis, sed lia avida edzino al Picot ĉion diris, ĉar ŝi volis la diamanton akiri. Pierre Picot forveturis al Parizo por tie intence fariĝi kelnero en la kafejo Loupien. Ĉiuj kompanintoj venadis ĉi-tien drinki, sed neniu el ili la kelneron ŝanĝiĝintan ekkonis. Ili eĉ ne konsciiĝis pri tio, kiam oni CHOBARD-on trovis jam mortan. Sur li kuŝis karteto kun numero 1. Iom pli poste mortis en sia lito SOLARIS je ia stranga malsano, veneno. Sur la brusto kuŝis karteto kun numero 2. La kelnero Loupien ĝis tiam ankoraŭ ne sciis pri kio temas, ĝis kiam dum unu nokto al li prezentiĝis per sia propra nomo. PICOT lin mortigis kaj metis sur lin karteton kun numero 3. La lasta kulpulo ALLU finfine konsciiĝis pri la kohereco kaj ne igis sin surprizi. Li pikvundis la senkompatan venĝanton kaj fuĝis Anglion. La mortanta PIERRE PICOT sukcesis sian historieton eldiri –rakonti ĉe la polico. Por Alexandre Dumas la polican registron en arkivo videble lia amiko kaj kunlaboranto A. MAGUET. La famekonata verkisto la historieton prilaboris kaj vastigis en riĉan rakonton kun pozitiva kulmino. La ĉefa heroo de la romano finfine ekkonas, ke la ideo je venĝo malgraŭ ĉio ne povas plenumi la reston de la vivo kaj ankaŭ, ke ne eblas per granda riĉeco ĉion aĉeti. Videble la efektiva Picot ne povas egali al la romana Dantes, se la rajto de la verkisto estas adapti la scenon kaj la figurojn al siaj bel-artistaj intencoj. Restas la fakto, ke la inspiro por verkado de la libro Grafo de MONTE KRISTO estis la realaĵo.*

*Jan Hora*

El "Spirit" oktobro 2004

Trad: Jací 18.1.2005

# Finiĝis la Abon-periodo 2004

La abon-periodo 2004 jam finiĝis per la lasta numero 128. Ĉi-tiu numero 129 jam estas la unua de la jaro 2005. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 130 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2005. La adres-etikedo de via **Informilo** informas vin per la mesaĝo **"Lasta Numero!!"**, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al **La Informilo.** Se efektive tia mesaĝo troviĝas sur ĝi, tiam bonvolu senprokraste pagi vian abonon laŭ la ĉi-suba tarifo.

La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE UEA ktp.) kaj eventualo pago por la sekvanta jaro 2006.

| JAROJ: | 2005 | 2006 | 2007 |
|---|---|---|---|
| Abonoj por adresoj en Francio: | 12 eŭroj | 12 eŭroj | 12 eŭroj |
| Abonoj por adresoj ekster Francio: | 16 eŭroj | 16 eŭroj | 16 eŭroj |
| Federacia kotizo: | 6 eŭroj | 6,30 eŭroj | 6,50 eŭroj |

**Vi povas pagi la koncernan sumon:**

1. **Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:**
   **Esperanto France-Est poŝtĉekkonto 1997 72W NANCY**
   Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.
   La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:
   ekzemple: abono Informilo + kotizo 2005 por 1036
2. **Per bankĉeko aŭ poŝtĉeko je la nomo de Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY sendita al jena adreso:**
   S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio
   Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, al Inter Ni, kotizo, disko, donaco al .... ktp
   Se necese menciu vian adres-ŝanĝon aŭ adres-korekton.
3. **Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen**, je la nomo de: **Hans-Dieter Platz**. (menciu la celon de via pago)
4. **Per internacia ĝiro je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2005 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY**
   (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)

La kasisto: André Grossmann

---



**Eugène Raveloson**, la redaktoro de la malagasa Esperanto-revuo **Inter Ni**, forpasis la 29an de decembro 2004. Li estis pioniro de la Esperanto-Movado kaj elstara persono en la historio de Esperanto en Malagasio kaj de Afriko. En la sino de la kultura asocio **UKS** li kreis korespondan kurson en Malagasio kaj eldonis la revuon **Inter Ni**. Li helpis fondi la asocion **UME** (Unuiĝo de Malagasaj Esperantistoj). Apenaŭ li estis emerita (komence de 2004) trafis lin tia sorto. Li ofte estis malsana. Certe grava perdo por la movado en Malagasio kaj en Afriko.

**Kia estas nun la estonteco de la revuo Inter Ni?**

Mi ricevis jenan respondon de la edzino de Eugène Raveloson, kiu ŝajne deziras transpreni la redaktadon. Jen kion ŝi skribis al mi en januaro:

Mi prezentiĝas: S ino **Raymonde Marie RANIVOHARISOA**. Mi estas la edzino de sro **Eugène RAVELOSON**. Mi ankoraŭ, ne havas grandan sciadon pri Esperanto sed mi ekinteresiĝas pri tio. Kaj la nevino de s-ro Eugène **(Nicole)** helpas min.

Kara Estimata Sinjoro Grossmann,

Mi dankas pro via letero. Mi kore ankaŭ dankas pro viaj sinceraj kondolencoj. Mi bone enpensiĝas rilate al via demando pri la revuo "**INTER NI**". Kaj decidas daŭrigi aperigi ĝin, sed bonvolu sinjoro akcepti ioman tempon, ĉar oni devas akordigi nian laboron kaj ankaŭ bonvolu klarigi al ni la disvolvadon de nia kunlaborado pri la revuo. Mi ne scias ĉu tio aranĝas vin, estas ĉio. Mi finas.

Dankegon, sinceran saluton al vi.

Tial eblas daŭre aboni la malagasan revuon **Inter Ni** por la jaro 2005 per pagoj al nia kasisto
18 eŭroj por subtena abono
14 eŭroj por simpla abono

André Grossmann

# *ni provu... rideti !...*



Forpasinta viro frapas ĉe la Granda Pordo de l'paradizo. Scivolemas lia Moŝta Pordisto :

" Pri kio temas ?

- Nu, lastan vesperon, je malfrua rehejmiĝo, mi malkovras mian edzinon, tute nuda sur la lito !... Mi tuj komprenis, kaj haste esploris la tutan apartementon, je la 15a etaĝo de alta turo, sed vane. Kiam mi malfermis la pordo-fenestron, kiu alirigas sur nian balkoneton, mi ekvidis du manojn alkroĉitajn sur la beton-planko !... Jen do la fripono, kiu volis eskapi !... Mi vigle frapis la du manojn perpiede sed la viro nur kontentiĝis kriaĉi ! Fine mi kaptis martelon, kiu efikis... sed la ulaĉo falis sur branĉojn malsupren, kie li restis ! Ĉar li daŭre moviĝis, mi pene puŝis nian fridujon sur la balkonon kaj balancfaligis ĝin eksteren... Nu, pro neeltenebla emocio mia koro ĉesis bati... kaj jen mi antaŭ Vi !...

- Fakte, via travivaĵo meritas lokon Ĉi-tie... eniru !".

Dua viro bruas ĉe la Granda Pordo, kie aperas lia Moŝta Pordisto, kaj tuj raportas :

" Mi ŝmirintis la balustradon de mia balkono, ĉe la 17a etaĝo de mia loĝejo... sed subite perdis ekvilibron ! Feliĉe, mi sukcesis kapti la balkonon de la 15a etaĝo, sed imagu, ke stultulo frakasis miajn manojn martele ! Dua falo malsupren en branĉaron... sed unu minuton poste mi ricevis fridujon sur la kapon... kaj tuj forpasis !... Jen la kialo de mia Ĉi-tiea ĉeesto...

- Nu, mi ja jus aŭdis tiun rakonton... Vi rajtas eniri !".

Tria viro aperas siavice ĉe la Granda Pordo...

" Pro kio, via alveno ?...

- Mi tute ne komprenas, kial mi ĵus mortis... Mi tutsimple kaŭris en fridujo !... ".

☆

Freŝbakita edzo trafas amikon la morgaŭon de la nupto-nokto... Ĉar li aspektas maltrankvila, la amiko pridemandas:

*„Ĉu ne feliĉa?...*

*- Nu, hodiaŭ matene, mi daŭre viktimiĝis je miaj antaŭaj kutimoj de fraŭlo.... Antaŭ ol foriri mi enmanigis ducent eŭrojn al mia edzino...*

*- Kvietiĝu, ne tro gravas...*

*- Hem... Imagu, ke ŝi redonis al mi kvindek eŭrojn!...".*

☆

Bush feritempas en Aŭstralio. Li alparolas hazarde kamparanon, kiu fiere informiĝas :

„Ĉu en via ranĉo kuŝas tiom vastaj tritiko-kampoj?

- Memevidente! Ankoraŭ pli grandaj ili estas!".

La kamparano, iom ekscitita, invitas la prezidanton en sian propran ranĉon...

„Vidu miajn bovojn! Ĉu la samajn vi posedas?

- Superflua demando! La miaj pezas dufoje pli!...".

Subite aperas aro da saltantaj kanguruoj...

„Nu, kiaj strangaj bestoj ĉi-tie!...

-Hum, se mi bone deduktas, vi ne havas lokustojn en Teksaso!...".

☆

Ina scivolemo...

„Se mi hazarde frue malaperus, pridemandas la edzino, ĉu ci denove edziĝus?

- Tute ne... karulino!

- Ne? Kial?... Ĉu ci ne aprezas la geedzecon?

- Ridinde! Evidente tion mi aprezas!

- Nu, diru do vere, kial ci ne denove edziĝus...

- Oj! Bone! ... por plezurigi cin, mi do denove edzigus! Ĉu kontenta?...

- ...Ĉu vere?... . Ci denove edziĝus?... mienas triste la edzino...

- Jes, jes, trifoje jes!...

- ...Kaj ci dormus apud ŝi, en nia lito?

- Evidente!... Se ne, kie ni devus dormi?...

- ... Kaj ci forigus miajn fotojn... por okulumi al ŝiaj?

- Hem... ci komencas tedi min pro stultaj demandoj!...

- ... Kaj ŝi uzus mian veturilon?

- Neee... ŝi ne scipovas stiri..."

☆



Ludoviko forlasas optikiston sed ne ankoraŭ alkutimiĝis al siaj novaj okulvitroj...

Li renkontas amikon;

*„Saluton, Petro! Kiel vi fartas? Sed ŝajnas ke vi iomete dikiĝis... kaj ke vi perdis multe da haroj... Nu, ankaŭ vi surhavas okulvitrojn? ...*

*- Sed mi ne estas Petro!*

*- Kia surprizo! Vi ankaŭ elektis alian propran nomon?..."*

☆

Johaneto rehejmiĝas post la kutima lerno-tago...

*„ Paĉjo, mi aludis cin en mia hodiaŭa redaktaĵo...*

*- Ĉu vere? Pri kio temis?...*

*- Nu, oni petis priskribi la homon, kiun oni pleje admiras!... Kiun oni ŝatus preni kiel modelon...*

*- Bone, tio tre plezurigas min... Sed kion ci skribis pri mi?*

*- ... Ci estas fortika, bela, inteligenta, helpema..."*

La patro, iom surprizita, tamen ege fieras!

*„ Mi ne sciis, ke mi estis tiom grava patro por ci!...*

*- Hem... Verdire mi ne sukcesis skribi senerare Arnold Schwarzenegger...".*

Tiu patrino eniras la ĉambron de sia filino kaj malkovras leteron sur la lito...

Tremante, ŝi eklegas...

*„ Manjo... Kun bedaŭro mi sciigas al ci, ke mi decidis forlasi la domon por vivi apud mia koramiko ... Li estas vere aminda, ĉarma, bela kun liaj tatuaĵoj sur la ŝultroj... kaj mi ŝatas sidi sur lia rapida motorciklo...*


*Hem... Mi forgesis ion... Mi estas graveda... Sed ne timu, mi estas dekvin jaraĝa kaj jam scias kiel prizorgi mian propran tagan vivon...*

*Cia filino, Tereza.*

La patrino ŝancelas, kaj konstatas, ke piede de la letero kuŝas ia post-skribaĵo:

*„Manjo, ĉio tio estas fuŝaĵo!... Mi vizitas ĉi-matene mian amikinon Anna... Mi deziris nur aludi ion, kiu multe pli gravas ol mia not-bulteno de la liceo, kiu kuŝas en la tirkesto de mia skribo-tablo....*

*Cin mi tutkore amas!... ".*







# DISTRA ANGULO

## Silab-enigmo ✪

Helpe de la ĉi-subaj vort-eroj alfabete ordigitaj, malkovru la vortoj, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, donas proverbon de Zamenhof.


al al ano ba be bur cen dek do ep es ig il io it jar ka ka kio ko ko ko la lam li mi naŭ ni ni no nu ogo or pe pe pi rep ri ro so so so so te ti ti ti to tri tro ur uz

| | | |
|---|---|---|
| 1 | + - - + - | brita mezurunuo |
| 2 | + - - + - - - | azio regno |
| 3 | + - - + - | popolnombrado |
| 4 | + - - + - - - | konkludo de proza verko |
| 5 | + - - + - - | malice ridaĉi |
| 6 | + - - + - - - | araba mantelo |
| 7 | + - - + - - - | aroma planto |
| 8 | + - - + - - | agadi ŝerce |
| 9 | + - - + - - - | lumvermo |
| 10 | + - - + - - | eŭropa lando |
| 11 | + - - + - - | ilo de pentristo |
| 12 | + - - + - | ŝtofo por meblo |
| 13 | + - - + - - | pikanta planto |
| 14 | + - - + - - - | artiste voĉlegi |
| 15 | + - - + - - - - | konforma al la sento de la belo |
| 16 | + - - + - | muzika intervalo |
| 17 | + - - + - - - | cerealo |
| 18 | + - - + - - - - - | marbirdo |

## Stvbrnz ✪

Sub tiu kodigita teksteto kuŝas pensiga aserto. Ĉiuj literoj estas anstataŭigitaj per aliaj. Ekzemple, ĉiuj **e** de la normala aserto fariĝis **a** en la enigmo...

li eibgtv ofmiŝa
ivntv gba dkli
ioama cfvntnipgi



**« Ne moku min ! Mi perfekte scias, kio estas elektronika poŝtaĵo... Kulpas nur la fendo de la antaŭa parto de mia komputilo, kiu estas tro malgranda por ricevi mian larĝan koverton !... ».**

En kafejo de stacidomo, kliento mendas: *„Mi deziras du ŝinko-sandviĉojn..? En unu vi ŝovu iom da mustardo...*
*- Tuj, Sinjoro... en kiun el la du vi deziras mustardon?...”.*

Iu Eskimo estas akuzita je ŝtelaĵo en iglo de najbaro...
La policisto: *„Kion vi faris dum la nokto inter la 28a de novembro kaj la 18a de aprilo?...”.*

Iu viro, kiu suferas ian surdecon... kaj je iom da mallaboremo murmuras : *« Se mi aŭskultus min, mi irus tuj al mia laborejo !... »*

## Solvoj de la lastaj enigmoj – N° 128

1 – **Silab-enigmo** : *Fajron estingas akvo, pekon pardono*
2 – **Stvbrnz** : *Politiko estas milito sen sango-elflu. Milito estas politico kun sango-elfluo*
3 – **Krucvort-enigmo**

Premiiĝis 4 legantoj, kiuj sukcesis solvi la 3 proponitajn enigmojn de nia jarfina konkurso:
Monique **BICHE**, Roland **CUENOT**, Michèle **GUINGOIN**, Ginette **MARTIN**. Nia libro-servo rekompensis ilin.
Gratulon !

# Ricevita el Japanio


"Decido pro Amo" kaj "la Sonorilo de Lumo kaj Muziko por Paco"

La Monumento sur la Monteto de Humaneco en la urbo Yaotu sonorigas mesaĝon de paco al la mondo, konceme al Sugihara Tiune. La instrumento el 160 tuboj ceramikaj konstruita en 1992.

De s-ino Simako YAMADA mi ricevis tre interesan libron kun la titolo **"Decido pro Amo"**. Tiu libro rakontas la agadon de japana diplomato **Sugihara Tiune** (ĉiune) dum la dua mondmilito.
Li estas la diplomato, kiu, dum la Dua Mondmilito, malfermis japanan konsulejon en Kaunas, la tiama ĉefurbo de Litovio, kaj kiel konsula agento, sen rigardo al sia sekureco, eldonis transit-vizojn al Japanio por pli ol dumil judaj familioj kontraŭ la ordono de la Japana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, kaj savis al ili vivon.
En 2000, en lia naskiĝ-urbo Yaotu estis inaŭgurita la Memordomo de **Sugihara Tiune.** Okaze de la 91-a Japana Esperanto-Kongreso okazinta en Inuyama, en oktobro 2004, la Loka Kongresa Komitato aranĝis ekskurson al "la Memor-domo de Sugihara Tiune". Tiurilate estis decidita esperantigi japanlingvan broŝureton pri humana agado de **Sugihara** kaj tiel aldoni Esperantan version al la jam ekzistaj angla kaj hebrea por informi pli vaste la mondon pri la merito de Sugihara. Ĉe la memordomo, kiun vizitas ne nur japanoj sed ankaŭ eksterlandanoj, la vizitantoj povos havigi al si ĉi tiun Esperantan version. **La libro estas akirebla ĉe la kasisto por 3 eŭroj, inkluzive afrankon.**

Okaze de la sama kongreso estis ankaŭ eldonita la libro **AL LA ĜOJO** kun akompano per piano Finala ĥoro el Simfonio N-ro 9, Op.125 de Ludwig van BEETHOVEN originalaj versoj de Fredrich von SCHILLER esperantaj versoj de Kálmán KALOCSAY adapto kun modifoj de KONISI Gaku.

Lernu Esperanton (eo)
Opi esperantoa (fi)
Ucz się Esperanta (pl)
学习世界语吧 (zh-cn)
Apprends l'espéranto (fr)
來學世界語 (zh-tw)
Learn Esperanto (en)
Uči esperanto (hr)
Lær Esperanto (da)
Aprenda Esperanto (pt)
Učte se esperanto (cs)
Aprende Esperanto (es)
Leer Esperanto (nl)
Lerne Esperanto (de)
Tanulj eszperantóul (hu)
Mokykitės esperanto (lt)
Impara l'Esperanto (it)
Apreneu Esperanto (ca)
Lær Esperanto! (no)
에스페란토를 배웁시다 (ko)
Учите эсперанто (ru)
Učte sa Esperanto (sk)
lernu!

moderne
attractif
performant ...

le CD-rom informatif
de la nouvelle
génération ...
à diffuser
sans modération !

en vente
à notre libro-servo
2 € à l'unité
1 € pour commande multiple